

Nekonata amiko,

Mi sendas al vi ĉi tiun leteron, kvazaŭ ŝiprompulo, kiu ĵetas mesaĝon ene de botelo en la maron. Mia nomo estas Laura. Mi loĝas en Cantabria (Hispanio), kaj mi estas instruisto pri desegnado.

Mi skribis ĉi tiun leteron en Esperanto, "la lingvo Internacia", ĉar jam de kelkaj jaroj mi laboras super esplora arta projekto pri Esperanto en rilato al mia familio. Mia praonklo, Andrés Herreros, estis instruisto de Esperanto en Torrelavega en la 30aj jaroj, kaj li mortis en la hispana intercivitana milito en la jaro 1936.

Mi konservas skatolon, kiu enhavas liajn esperantajn korespondaĵojn, kaj inter liaj multnombraj poŝtaj bildkartoj mi trovis pluraj de la verda stelo, kiuj estis senditaj el via adreso.

La celo de ĉi tiu letero estas kontakti la amikojn, samideanojn, de mia praonklo Andrés, kaj tiel rekonstrui tiun parton de nia familia historio.

Se vi ankoraŭ konservas iun el la bildkartoj senditaj de mia praonklo, kaj vi povus sendi foton aŭ iun ajn alian informon, tio forte antaŭenpuŝos mian projekton.

Mia retpoŝta adreso estas amigadelamandarina@hotmail.com, estos bele, se ĉi tiu "mesaĝo en botelo" alvenos al sia celo.

Koran dankon pro via peno traduki ĉi tiun leteron skribitan en Esperanto.

Laura